# *Vizitas Kubon la ?efministro de Orienta Timoro*



Por plenumi oficialan laborviziton alvenis al Kubo Rui Maria de Araujo, ?efministro de orienta timoro, kiu estas akceptita de la kuba prezidento Raúl Castro kaj aliaj altrangaj gvidantoj de la insulo.

La vizitanto esprimis ke la rilatoj inter amba? landoj estas eminentaj kaj dankis al la insulo pro la signifoplena ?eesto de la kubaj kunlaborantoj en sia lando.

Kiel parto de sia laborprogramo, Rui María de Araujo vizitos la centron de genetika in?enierado kaj bioteknologio (CIGB) kaj la universitaron de fizika kulturo kaj sportoj "Manuel Fajardo".

Kubo kaj Orienta Timoro komencis en 2005 kunlaboran programon pri edukado, kaj de tiam diplomi?is en la insulo kariba, 847 gestudentoj, plej parte en la sansektoro.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/71333-vizitas-kubon-la-cefministro-de-orienta-timoro

**Radio Habana Cuba**